

Jos rakontas

Kvizo: **Respondoj!**

1. Kiu ligno bone brulas eĉ malseke? > **la betula ligno**
2. Kiu arbo pleje fekundas post sia centjariĝo? > **la pirarbo, kiu tiam donas la plej multajn fruktojn**
3. El la floroj de kiu arbo estas farita la tiel nomata akacia mielo? > **el tiuj de la robinio**
4. Kiu ligno fariĝas vere tre solida? > **la kverka ligno**
5. Kiuajn guŝoj volonte frandas ĉevaloj? > **tiujn de la kristodorna glediĉio**
6. Kiu arbo estas la plej ŝatata de feoj kaj gnomoj? > **la frakseno**
7. El kiu arbo fareblas tre dolĉa siropo? > **el la (kanada) acero: "acera siropo" aŭ france 'sirop d'érable'**
8. El la suko de la folioj de kiu arbo la insekto 'kokĉasisto' drinkas ĝis kompleta ebriiĝo? > **de la karpeno**
9. Per kies floro la fianĉinoj ŝatas ornami sin? > **per florbranĉoj de la kratago**
10. Kiu ligno neniam putras subakve? > **la alna ligno (de la alno)**
11. Kiu arbo vivas tiom longe kiom longe homo? > **la japana ĉerizarbo: ĉirkaŭ 70 jarojn**
12. Per la branĉoj de kiu arbo oni antaŭe balais la kamentubojn? > **de la ilekso**

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
Japana ĉerizarbo											x	
betulo	x											
robinio			x									
karpeno								x				
kristodorna glediĉio					x							
pirarbo		x										
ilekso												x
frakseno						x						
acero							x					
kratago									x			
kverko				x								
alno										x		